

Esperanto-vivo en Svislando, 11-a parto
Kongresoj, somero 1971
Claude Gacond, 400-a radioprelego, 1971.06.09 & 12

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kun la monato junio komenciĝas la esperanto-sezono, tio estas la kongresa periodo. Ĉiuj esperantistoj informiĝas pri la diversaj manifestacioj, kiuj permesos renkonti aliajn esperantistojn, kaj de tempo al tempo ili decidiĝas aliĝi al kongreso. Estus interese scii, kia procento de la esperantistoj ĉiujare aktive partoprenas la esperanto-vivon.

A.- Sed ciferojn ni ne havas. Ĝis nun ni eĉ ne kapablis ricevi firmajn informojn pri la nombro de partoprenintoj en ĉiuj pasintjaraj esperanto-kongresoj. Do eĉ statistiko de la aktivaj esperantistoj ne estas ebla.

Cl.- Redaktante la periodaĵon *Svisa Espero* mi provas registri la ĉefajn kongresojn, kiuj povas interesi svisojn. Jen la listo de la ĉi-someraj tiel listigitaj manifestacioj kun kelkaj informoj. Se vi ne ankoraŭ elektis la kongreson, kiun vi partoprenos, eble ni alportos al vi la decidigajn informojn.

A.- Ĝus okazis fine de majo en Maribor, Jugoslavio, la 23-a Kongreso de la Fervojistoj kaj en Opatija, ankaŭ Jugoslavio, fervojista postkongreso.

Cl.- Je la 1-a de julio malfermiĝos en Balaruc-les-Bains, suda Francio, Kampinga Internacia Renkontiĝo, kiu daŭros dum la unua duono de julio.

A.- Samtage, do ankaŭ la unuan de julio, malfermiĝos la jubilea rendevuo en la Esperanto-Somerumejo de Primošteno, Jugoslavio. Tiu jubileo signifas, ke malgraŭ malfacilaĵoj la esperantistoj daŭre renkontiĝos sur tiu duoninsulo.

Cl.- La malagrablaĵoj estas, ke la krokodilaj turistoj inundis tiun belan somerumejon, kiun la esperantistoj malkovris. Tamen ni konsilas al la banemuloj tiun restadejon, kie deĵoros esperantistoj dum la tuta julia monato.

A.- De la 4-a de julio ĝis la 4-a de septembro la someraj kursoj en la Kastelo Grésillon grupigos esperanto-komencantojn kaj progresantojn en okcidenta Francio. Studsemajnoj kaj turismaj ferioj vice allogos ĉiujn, kaj ni scias, ke jam ne plu restas lokoj por kelkaj aŭgustaj periodoj.

Cl.- La 9-a Somera Esperanto-Universitato en Gyula, Hungario, malfermos sian pordon je la 4-a de julio por unu semajno, kie oni povos intimiĝi kun la hungara kaj esperanta kulturoj.

A.- La 17-an de julio la Natur-Amikoj renkontiĝos en Abaliget, Hungario, por la 4-a Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj-Naturamikoj. Ekskursoj piedaj kaj aŭtobusaj en montareta interesa regiono kaj festoj estas listigitaj en la programo. Tio por dek tagoj.

Cl.- La saman tagon malfermiĝos en Torun, Pollando, la 3-a Esperanto-Ferio por Mez-Lernejanaro. Dum du semajnoj dank'al tiu aranĝo, geknaboj 15 ĝis 20 jaraĝaj pli intime konatiĝos kun la lingvo esperanto kaj kun la belaj ĉirkaŭaĵoj de la urbo Torun.

A.- Ankaŭ en Torun, Pollando, okazos de la 21-a ĝis la 25-a de julio la 7-a Internacia Esperanto-Seminario. La partoprenantoj laboros en kvar tem-grupoj gvidataj de fakuloj. Studtemoj : Kontribuo de la poloj por la monda kulturo.

Cl.- En la sama periodo multiĝos la antaŭ-kongresaj manifestacioj. Ni menciis de la 24-a ĝis la 30-a de julio la Internacian Semajnon en Gotenburgo, Svedio, el kie la partoprenantoj are vojaĝos al Londono.

Esperanto-vivo en Svislando, 11-a parto
Kongresoj, somero 1971
Claude Gacond, 400-a radioprelego, 1971.06.09 & 12

A.- En la najbara lando Danlando samtempe okazos du restadoj : la antaŭ-kongresa semajno en la feria centro Kosmos de Martinus-Instituto, kie oni prelegos pri esencaj demandoj de la vivo.

Cl.- En Helsingör disvolviĝos la nun famiĝintaj Internaciaj Feriaj Esperanto-Kursoj. Ni konsilas ilin al ĉiuj geaŭdantoj, kiuj dezirus ellerni esperanton en agrabla restadejo.

A.- Kaj nun, kun la fino de la monato julio, alvenos la du ĉefaj kongresoj. En Londono UEA organizos la 56-an Universalan Kongreson de Esperanto kaj en Parizo SAT sian 44-an Kongreson.

Cl.- Ni iomete bedaŭras la samtempecon de tiuj du plej gravaj esperanto-manifestacioj. Ambaŭ organizaĵoj devus foje konsenti por iomete pli da kunlaboro.

A.- En Londono kunsidos du aŭ tri miloj da gesamideanoj. En Parizo ili estos kelkaj centoj. Ambaŭloke ili havos la okazon mediti pri la nunaj problemoj propraj al esperantio, tio inter festo-tagoj, prelegoj, baloj, ekskursoj.

Cl.- La esperanto-junularo kunvokis la gejunulojn al Edinburgo en Skotlando. Tie de la 8-a ĝis la 14-a de aŭgusto la junularo siavice debatos pri siaj problemoj inter baloj kaj festoj. Povu tio okazi sen la ĉeesto de bombo.

A.- Samtempe en Francio postkongreso okazos en Les Houches. En bela alpa regiono la migremuloj povos kontentigi sian migremon.

Cl.- Kun la monato septembro, kaj tio sammomente, malfermiĝos du manifestacioj. En Strasburgo, Francio, la gejunuloj debatos pri la temo Lingvo kaj Kulturo. Se ni havos tempon, ni pretigos por ili radio-prelegon pri tiu temo.

A.- Kaj ankaŭ je la 5-a de septembro, en Svislando, malfermiĝos Eŭropa Ferio-Semajno, tio en FÜRIGEN, en la regiono de Lucerno. Ĝin organizas plian fojon Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj.

Cl.- Por la unua fojo okazos en tiu ferio-semajno, kiu jam grupigis ĝis nun entute pli ol 600 geesperantistojn, tri kursoj, unu por la komencanto, unu por la progresantoj, kaj unu por la oratoremuloj.

A.- Ni kuraĝigas la radio-geaŭdantojn profiti pri tiu Ferio-Semajno en unu el la plej belaj regionoj de Svislando, por intimiĝi kun la vivo en nia lando kaj kun la lingvo esperanto.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-